

# le monde de l'ESPERANTO

numéro

574

15 mai 2010

Dans le décor enchanteur du lac Atitlan au Guatemala, le tourisme solidaire se développe grâce à l'espéranto. Une rencontre authentique entre hommes et femmes d'horizons différents.



**DOSSIER**

## L'espéranto en Amérique centrale

PAGE 6

**ACTUALITÉS**

Robert Phillipson, Prix Linguapax 2010

PAGE 5

## éditorial • frontartikolo

« Si on te voit pas, on dit que tu ne fais rien, c'est trop, si on te voit trop, on dit que tu en fais trop, c'est rien »  
(Kheops avec Def Bond et Akhenaton - Def Bond  
(Secret Défense remix).



En faisons-nous trop ou pas assez ? Je vous laisserai méditer cette formule, tout en considérant que nous ne trouvons ni dans un extrême ni dans l'autre. Et l'auto-glorification et la repentance sont des exercices qui tous deux me répugnent. En tout cas c'est avec le sentiment d'avoir travaillé à remplir le tonneau des Danaïdes que je vous quitte après 6 ans intenses passés au CA de notre association.

Avant de partir, je profite de l'espace qui m'est accordé ici pour vous appeler à soutenir la radio polonaise en espéranto, une nouvelle fois menacée de suppression. Pour exprimer votre soutien à cette radio sur internet, pierre angulaire du mouvement espéranto international, écrivez en français (ou polonais, anglais) aux adresses suivantes :

Président de la Radio Polonaise, Jarosław Hasinski, Prezes Zarządu PR S.A., al. Niepodległości 77/85, PL-00-977 Warszawa, Jaroslaw.Hasinski@polskieradio.pl et

M. Tomasz Orłowski, Ambassadeur de Pologne en France, 1, rue de Talleyrand, 75343 Paris Cedex 07, paryz.amb.sekretariat@msz.gov.pl

Ecrire en copie à : esperanto@polskieradio.pl, barbarinella@gmail.com

Espéranto France l'a fait, à votre tour manifestez votre attachement à ce programme. On n'en fera jamais trop pour la Radio Polonaise en espéranto !  
Bonne lecture, cordialement,

Aleks Kadar, président

“ Si e oni ne vidas vin, oni diras, ke vi faras nenion, estas tro, se oni tro vidas vin, oni diras, ke vi faras tro, ne gravas “.  
Ĉu ni faras tro au maltro ?

Mi lasos vin pripensi tiun parolturnon, mem konsiderante, ke ni situas nek en unu ekstremo nek en la alia. Kaj sinlaudado kaj pentado estas ekzercoj, kiuj malplaĉas al mi.

Ĉiukaze, kun la sento esti laborinte por plenigi senfundan puton, mi forlasas vin post 6 plenaj jaroj pasigitaj en la Komitato de nia asocio.

Antaŭ ol foriri, mi profitas la spacon allasitan al mi ĉi tie por petegi vin subteni la Polan Radion en Esperanto, denove minacata je forigado. Esprimu vian subtenon al tiu reta radio, fundamenta monumento de la internacia Esperantomovado, skribante al adresoj supre menciitaj. Neniam ni faros tro subtene al la Pola Radio en Esperanto !

Bonan legadon, verdkore,

Aleks Kadar, prezidanto

## ACTUALITES

► Robert Phillipson,  
Prix Linguapax 2010 p.5

## DOSSIER

► Esperanto en  
Mez-Ameriko p.6

## ASOCIA VIVO

► Decidaro de la  
Komitatkunsido p.11

## VOYAGES

► Pri Ukrainio kaj azova  
maro p.18

Revue d'espéranto fondée en 1908, éditée par Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (Tél. 09 51 77 18 33 - Fax 01 42 78 08 47 - www.esperanto-france.org)  
Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org  
Bimestriel : 6 n° par an - Dépôt légal à parution  
**Tous droits de reproduction réservés**

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.

Directeur de publication : A. Kadar

**Rédacteur en chef** : Claude Nourmont  
mondo@esperanto-france.org

Envoi des articles 1 mois avant parution

Ont aussi participé ou contribué à ce numéro :  
F. Bartsch, G. Camy, J.M. Cash, P. Chavignon,  
D. Couturier, K. Demianenko, M.H. Desert,  
M. Eaton, B. Flochon, G.K. UEA, C. Hurstel,  
D. Janot, A. Kadar, K. Kováts, Kvinpetalaj staĝanoj,  
E. Leclerc, F. Levêque, F. Lo Jacomo, G. Martin,  
F. Martorell, B. Moon, J.F. Passarella, C. Reale,  
M. Rousset, G. Thomas, L. Wunsch-Rolshoven.  
Merci à eux !

Publicité/annonces : à la rédaction  
Abonnement : 1 an (6 n°) : 30€ à :  
Espéranto-France, CCP : 855.35 D Paris  
Impression : IPPAC, Langres (52),  
membre de Imprim'vert

Imprimé en mai 2010  
Mise en page : Bruno Flochon



ISSN 1628-1942 - Commission paritaire : en cours

## Table ronde

### « Quelle(s) langue(s) pour l'Europe ? »

**C**'est dans le cadre du Colloque « 60 ans d'Europe, quelle Europe voulons-nous bâtir ? » (30-31 mars), organisé par les Jeunes européens-Lille, en partenariat avec le Mouvement européen-Belgique et les Jeunes européens-Belgique, qui a réuni 50 personnalités et 1 000 jeunes français et belges, qu'a eu lieu cette table ronde, sous-titrée *Identité nationale et européenne*.

« Seul contre tous, dans une arène éberluée par son opiniâtreté, Marc Rousset déclare que « c'est inéluctable, un jour nous parlerons espéranto en Europe ». Cette déclaration déchaîne

les passions et un flot de questions et de contestations, auxquelles il répond avec conviction. Par dessus tout, comme les autres intervenants, c'est pour le multilinguisme que plaide l'espérantiste préconisant, outre la langue maternelle, l'apprentissage d'autres langues nationales, gage de notre diversité culturelle, valeur fondamentale de la civilisation européenne ». (Extraits du compte-rendu)

[Ndlr. Marc Rousset est ancien Directeur Général de Véolia, d'Aventis et de Carrefour et auteur de *La Nouvelle Europe*.]

### « Une colonie ordinaire du XXI<sup>ème</sup> siècle »

**N**ouvel ouvrage de Charles Durand, « Une colonie ordinaire du XXI<sup>ème</sup> siècle », chez l'éditeur belge EME dans sa collection « Société ».

Depuis 1945, l'empire américain n'a cessé de croître et de consolider son influence. L'anglais et le dollar en sont les deux piliers principaux. Comme avec toute autre structure impériale, l'expansion de l'empire, dont l'Europe continentale fait malheureusement partie, se traduit dans ses pays satellites par l'émergence d'un conformisme appauvrissant, de la puérité, d'une police de la pensée, donc de l'autocensure et d'un inflexible notable de la créativité.

Si dans certaines parties du monde, l'empire s'impose par ses forces armées, en Europe, il se base sur la « colonisation mentale » des populations, c'est-à-dire par une véritable

occupation des esprits entraînant ainsi des modifications profondes dans la pensée et le comportement. Charles Durand met en évidence ces phénomènes, les décortique et montre les relations qu'ils ont avec la diffusion de l'anglais, langue prétendument internationale dont le système officiel veut nous gaver, tout comme avec les produits « culturels » et idéologiques qu'elle sous-tend. Il braque le projecteur sur des

sujets auxquels nous ne sommes pas censés nous intéresser et nous livre une démonstration implacable révélant notre transformation depuis une trentaine d'années.

Ce livre a pour but la prise de conscience de notre état de fait et de provoquer le nécessaire sursaut salutaire aboutissant in fine à notre affranchissement.

(d'après la couverture de l'ouvrage)



## en bref • mallonge

### ● GUIDES AEDIS EN ESPÉRANTO

L'association Réinsertion et Espéranto, qui est à l'origine des petits guides AEDIS sur l'Espéranto, fait savoir qu'on peut trouver ces petits guides dans son bureau de Poste.

Si l'espéranto ne figure pas dans le vôtre, vous pouvez demander qu'il y soit, en vous adressant au directeur de votre agence postale.

Pour plus d'info : DEMONGEOT Claudy <testudeto@gmail.com>

### ● DICTIONNAIRE EN LIGNE

Dominique Couturier a numérisé et mis en ligne le dictionnaire français-espéranto de Roger Léger et André Albault (épuisé). Une seule restriction pour le moment : il faut être inscrit sur le réseau social Ipernity pour pouvoir télécharger (gratuit). Vous trouverez les fichiers zippés à l'adresse [www.ipernity.com/doc/onagrino/album/173174](http://www.ipernity.com/doc/onagrino/album/173174).

Chaque « zip » contient un dossier pour une lettre. Et ce dossier, une fois décompressé, contient plusieurs pages concernant une lettre donnée.

### ● LA VILLE DE PIERRE

Le roman d'Anna Löwenstein « La ŝtona urbo » a été traduit en français par Godeleine Logez et Ginette Martin. Il vient d'être édité à compte d'auteur et sera disponible lors du congrès à Kaiserslautern.

### ● LIVRE D'OR

Povilas Jegorovas est entré dans le Livre d'Or du Millénaire de la Lituanie. Sa biographie, parue aussi dans le « Kas yra kas » (qui est quoi ?) retrace sa carrière espérantiste. Il a grandement contribué à la renaissance du mouvement espérantophone en Lituanie.



## Pétition pour l'Espéranto au baccalauréat

**L**e projet a bel et bien démarré. Comme prévu, une première réunion a eu lieu et nous a permis de (re)travailler sur son processus de mise en oeuvre, sur le texte même de la pétition (qui va sous peu être présenté au Conseil d'Administration de Sat-Amikaro) ainsi que sur le courrier qui l'accompagnera lors de notre campagne de recherche d'une centaine «d'éminents soutiens». Et nous vous sollicitons quant à la recherche de ces potentiels « éminents soutiens». Il nous faut en effet collecter une large et riche liste de personnalités signataires dont le renom donnerait

encore plus de poids à notre démarche. Les personnalités politiques seront automatiquement contactées (députés, sénateurs, présidents de conseils régionaux, généraux, etc.) et nous souhaitons aussi contacter des personnalités de divers domaines tels que artistes, sportifs, écrivains, présidents d'associations nationales et internationales, etc.

Nous vous demandons de bien vouloir noter les nom, prénom, adresse et domaines d'activité de ces personnalités et nous les communiquer à l'adresse suivante :

Guy Camy, 17 rue du Cambeilhou,

64400 Oloron Sainte-Marie ou par courriel à [guy.camy@orange.fr](mailto:guy.camy@orange.fr)

S'il s'agit d'un « contact personnel », peut-être souhaitez-vous envoyer vous-même le courrier à cette personne, merci de nous l'indiquer. Nous vous communiquerons les éléments nécessaires une fois toutes les propositions recueillies et classées afin d'éviter toute redondance.

Délai de réponse souhaité : 15 juin 2010 (pour envoi simultané).

Nous vous remercions par avance de votre coopération.

Guy Camy

## Robert Phillipson, Prix Linguapax 2010

**À** l'occasion de la Journée Internationale des Langues Maternelles, Linguapax récompense tous les ans une personnalité (linguiste, chercheur, enseignant)



en reconnaissance de son engagement envers la diversité linguistique et culturelle et l'éducation multilingue. Cette année, les lauréats ex aequo du prix Linguapax sont Miquel Siguan et Robert Phillipson, grands défenseurs de l'éducation multilingue comme facteur de paix et des droits linguistiques face aux processus d'homogénéisation culturelle et linguistique.

Robert Phillipson (Grande-Bretagne, 1942) est professeur émérite de la Copenhagen Business School. Mondialement reconnu pour sa critique de l'impérialisme linguistique, spécialiste des relations entre langue et pouvoir et des dynamiques de domination/subordination linguistique. Auteur de nombreuses publications sur les droits linguistiques, ses titres les plus connus sont *Linguistic Imperialism* et *English-Only Europe?: Challenging Language Policy*. Cet ouvrage est traduit en espéranto. Robert Phillipson a participé à plusieurs symposiums Nitobe.

(info : Linguapax, GK de UEA)

## UNE DÉLÉGATION ESPÉRANTOPHONE AU PARLEMENT POLONAIS

**L**e 4 mars, Jerzy Szmajdzinski, vice-président de la Diète polonaise, a reçu au Parlement une délégation espérantiste, avec le Dr Ilona Koutny, Franciszek Witucki, Edward Kozyra, Kazimierz Krzyzak et Marian Zdankowski. Ils ont exprimé au vice-président leur souhait que l'espéranto reçoive le même statut que les autres langues vivantes dans le système éducatif polonais. Les parlementaires ont accueilli favorablement la proposition. Ils ont suggéré que le groupe espérantiste propose au Ministre de l'éducation d'entamer une procédure pour la réalisation de cette proposition. Ils ont aussi déclaré soutenir l'initiative. La rencontre a eu lieu dans une ambiance amicale et s'est terminée par une photo (voir ci-dessous).



[Jerzy Szmajdzinski était parmi les personnalités qui se rendaient aux cérémonies de commémoration du massacre de Katyn, dans l'avion qui s'est écrasé près de Smolensk le 10 avril].

([info@esperanto.bydgoszcz.eu](mailto:info@esperanto.bydgoszcz.eu), GK de UEA)

Mezameriko belas kaj buntas.  
Aŭtenta renkontiĝo kun lokuloj,  
malkovro de kulturoj, disvolvo de  
solidara turismo.



## ESPERANTO EN MEZ-AMERIKO

**S**aluton, Philippe. Vi ofte iras al Mezameriko, ĉu ne? Kio logas vin tien?

Philippe Chavignon : Kiel mondvojaĝanto mi evidente trairis la Amerikojn kaj memkompreneble Mezamerikon kiu troviĝas inter Sudameriko kaj Nordameriko. En 1985 kiam mi unuafoje trapaŝis Mezamerikon, estis civila milito en pluraj landoj. Mi ne multe restadis sed kiam mi vidis la lagon Atitlan, mi decidis ĉirkaŭmarŝi ĝin. Oni malkonsilis al mi fari tion, do mi faris. La danĝero montriĝis certa kaj juna militisto preskaŭ pafis min. Malgraŭ la tiama milita etoso, la kvintaga vagado lasis al mi neforgeseblajn memoraĵojn. La eksterordinara beleco de la pejzaĝoj ornamitaj de la

eksterordinara bunteco de la majaa kulturo specifa en ĉiu vilaĝo konsistigas nekompareblan koktelson.

*Ĉu vi iris en plurajn landojn de Mezameriko?*

Okaze de miaj multnombraj vojaĝoj en la Amerikoj, mi surpaŝis la grundon de ĉiuj amerikaj landoj krom la angla Gvajano kaj dum la lasta jardeko plurfoje mi trairis Mezamerikon, ŝoŝee, aere, mare, pade.

*Kial vi elektis ĉefe Gvatemalon?*

Ĉu Kristoforo Kolumbo malkovris Amerikon, ĉu Ameriko malkovris Kolumbon? Ĉu mi elektis Gvatemalon, ĉu Gvatemalo elektis min? Gvatemalo estas unu el la plej belaj landoj de la mondo. Oni povas vidi multe da diversaj interesaj aspektoj, fizikaj, naturaj, homaj, arkitekturaj, antaŭkolumbaj, lingvaj, ktp. en eta teritorio. Estas unu el la landoj kies indiĝena popolo konsistigas la plejmulton.

*Kiajn homojn vi renkontis tie?*

El miaj unuaj kontaktoj, la plej memorindaj estas kun avo Don Marto kaj lia nepo Aleksander. Don Marto estis jam maljuna sed saĝulo inter la saĝuloj de la vilaĝo San Antonio Palopo apud la

lago. Tiam ĉiuj viroj ankoraŭ surmetis la tradician vestaĵon de San Antonio. Aleksander estis tre kvieta knabo kiu pasigis multe da tempo kun la avo kaj la saĝeco de unu ŝajnis enversiĝi en la alian, silente. Sepjara en 1993, li instruis al mi konstrui paperajn kajtojn, silente. Li pasigis kun ni sep monatojn en Francio en 2005 kiam li partoprenis la kongreson en Bulonjo. Li baldaŭ diplomiĝis kiel inĝeniero, la unua kiu atingis superan nivelon de studado en vilaĝo de 12 000 enloĝantoj!...kaj ankaŭ la unua kiu lernis Esperanton! Poste mi renkontis esperantistojn, inter tiuj mi memoras pentriston el Nikaragvo, fuĝintan la militon. Li donacis pentraĵeton al mi kiun mi ankoraŭ havas. Li poste iris al Usono kaj mi neniam plu aŭdis pri li. Mi havas pli da kontaktoj inter la indiĝenoj ĉar mi dividas kun ili la respekton de la naturo kaj alian aliron al la scio ol la kutima en la malbone nomataj okcidentaj kulturoj - kvankam «okci» aludas la morton same kiel la direkto de sunsubiĝo en multaj kulturoj -.

*Kiel vi kontaktas kun la indiĝenoj? Ĉu per hispana lingvo, ĉu per loka indiĝena lingvo?*

Don Marto komprenetis la hispanan

### En préparation, les prochains dossiers

LME 575 : Esperanto, peranto inter kulturoj

Envoyez vos contributions à  
mondo@esperanto-france.org



sed ne parolis ĝin. Aleks estis lia interpretisto. Malgraŭ mia intereso por la lingvoj kiu manifestiĝis kiam mi samtempe mondvojaĝis kaj eklernis Esperanton, mi sukcesis lerni nur kelkajn vortojn el la kakĉikela kaj kiĉea lingvoj. Estas dudektri indiĝenaj lingvoj kaj variantoj en Gvatemalo. Krome la fonetiko estas malfacila. Sed mi ankoraŭ ne rezignis. Do plej ofte mi komunikas per la hispana kvankam en Mezameriko ne ĉiuj indiĝenoj sciopovas la hispanan. Antaŭ kelkaj jaroj mi partoprenis nacian kongreson de la «kunaj» indiĝenoj en Panamo kaj la kacikoj parolis en sia etna lingvo kun interpretisto. Estas interese ke eĉ ene de siaj komunumoj, dum la tiel nomataj kongresoj, la saĝuloj parolas en la kuna lingvo kaj estas interpretisto kiu reformulas -interpretas!- la paroladon de la saĝulo...kunlingve!



Ĉu vi povus mallonge rakonti pri la majaa kulturo? Krom monumentoj, kio restas el ĝi en la vivo tiea (lingvo, vivmanieroj, ĉiutagaĵoj, pensmaniero...)? Ĝia fundamento estas la biblio de la majaoj, la «Popol Vuh» alinomata «Pop Vuh» de indiĝenaj kleruloj, pli konforme al la fonetiko de la majaa lingvo.

Kvankam estas malfacile enprofundiĝi en la indiĝenan mondon, ŝajnas ke pro ia kialo la plejmulto de la maljunaj



saĝuloj ne transgeneraciigas siajn esoterajn konojn tradiciajn.

Kvankam Aleks estas saĝa junulo, li

sciis preskaŭ nenion pri la historio kaj kulturo de la majaoj malgraŭ sia proksimeco kaj intimeco kun Don Marto kiu sendube estis «inicito». Mi supozas ke la saĝuloj, sciante ke fino de ciklo alproksimiĝas - 2012, intue decidis ne plu inici.

Pri kulto, oni povas konstati, ĉefe en sanktegaj lokoj kaj en la plej aŭtentaj regionoj, ke majaaĵ ritoj ankoraŭ praktikiĝas. Sed pro la longa kunvivado kun kristanismo temas pri sinkretismo. En departamento Solola kie mi loĝas kaj kie situas la lago Atitlan, la longtempa kunesto kun turistoj jam senidentigis multajn indiĝenojn, eĉ se sub la trompa aspekto de tradiciaj vestaĵoj.

La trudado de niaj «okcidentaj» politikaj modeloj multe kontribuis al perdo de identeco. Ekzemple, nia demokratia sistemo enkondukis siajn perversajn efikojn kiuj ne ekzistis kiam unuanimeco estris la politikan sistemon. Kiam oni decidis unuanime, la decido estas multe pli potenca kaj ne estas ebleco influi por havi plejmulton. Tion mi fakte lernis pli kiam mi partoprenis la kunvenojn en Ĝenevo, ol en Ameriko mem.

Pluraj anekdotoj kiujn mi spertis en Gvatemalo tamen montris al mi, ke la indiĝenoj kiuj aspektas sufiĉe submetitaj povas en certaj cirkonstancoj reagi kolektive kaj tre firme kiam la majaa spirito revekiĝas en la popolo.

Estas oftaj miskomprenoj en rilatoj kun ili dum la ĉiutaga vivo, ne nur pro uzo de la hispana kiun ili ne perfekte regas, sed pro malsimileco de pensmaniero. Mi ne scias ĉu vi ĉeestis la prelegon de Mark Fettes en Bjalistoko pri eduk-sistemo adaptita al junaj indiĝenoj. Estis ege interese. Ili ofte malsukcesis nur ĉar ilia koncepto de la mondo ne kongruas kun la instru-metodoj kaj -enhavoj «okcidentdevenaj».

La indiĝenaj lingvoj estas ankoraŭ multe parolataj pro la proporcio de indiĝenoj sed, kiel en aliaj mondopartoj, estas la fenomeno ke la gepatroj kelfoje ne instruas la etnan lingvon al la idoj pensante ke ties scipovo malhelpas socian sukceson.



Ĉu vi renkontis esperantistojn en tiu lando?

Jes, antaŭ dudek kvin jaroj estis grupo sufiĉe vigla. Grupo da junuloj aktivis dank 'al la ĉeesto de Anne Ambles kaj de germanino Martina Sachs.

Ĉu vi informis pri esperanto kaj instruis/instruas ĝin tie?

Tiam estis kursoj en la «franca alianco» en la ĉefurbo. Antaŭnelonge mi retrovis en miaj arkivoj belan invitilon presitan de la franca alianco kiu anoncis prelegon mian. La salono estis plenplena inter kiuj kelkaj eminentuloj. Poste en la tria jarmilo de la komuna erao, mi instruis al indiĝenoj kadre de la projekto Indiĝenaj Dialogoj.



*Ĉu sukcese?*

De la ok gelnantoj, nur la tri viroj (Aleks, Ruben Ortiz kaj alia junulo Gilbert) kapablas paroli esperante. Estas granda bedaŭro por mi, ke mi instruis kadre de organizo de/por virinoj kaj ke neniu virino daŭrigis la studadon post la kurso.



*Kiel vi enkondukas Esperanton ĉe la indiĝenoj? Kiel reagis la indiĝenoj al tio?*

Ekzemple dum la kuna kongreso en Panamo, oni permesis al mi paroli dum kelkaj minutoj. Mi ĝenerale argumentas ke ne estas racie denunci la perfortaĵojn de la koloniaj potencoj pere de ties lingvoj kaj ke krome paroli la lingvon hegemonian estas fariĝi komplico de la hegemonio, de perdo de identeco... Poste la nenieseco/ĉieseco de Esperanto favore impresas. La homoj aplaudas, ...la karavano pasas! Sed ni luktas kontraŭ antaŭjuĝoj favoraj al la angla kiuj estis martelitaj kaj ĉizitaj de jardekoj en la mensoj de la latinamerikaj popoloj. Eble la apero de novaj gvidantoj kontraŭusonaj kiel Evo Morales en Bolivio estas bona oportuneco por enŝovi Esperanton.

*Vi tie evoluigis programojn de solidareca turismo. Kiel tio funkcias?*

Kiam Indiĝenaj Dialogoj pli malpli kolapsis jen pro homaj konfliktoj, jen pro financaj problemoj, mi decidis fari mian eblon por savi el la ruinaĵo tion kio restis de la grandaj investoj faritaj. Mi klarigis al la mezamerikaj membroj de Indiĝenaj Dialogoj ke la nura

maniero plu vivi la projekton estas trovi agadkampojn finance memstarajn. Ili mem petis, ke mi helpu ilin starigi ekoturismojn indiĝenan ĉe esperantistoj por motivi la lernadon de Esperanto ĉe indiĝenoj.. Mi reklamis okaze de kongresoj kaj inter miaj konatoj ekster Esperantujo.

5% de la buĝeto servas por financi solidaran projekton. Lastatempe mi uzis tiun sumon por financi stipendiojn, prioritare por junulinoj indiĝenaj kiuj subskribas kontrakton per kiu ili sin devontigas esti sukcesaj pri studado, havigi fakturojn de siaj elspezoj, lerni esperanton kaj estontece dediĉi parton de sia salajro por financi studadon de aliaj junulinoj.

Kvankam la vojaĝoj okazas nun nur en du landoj, Gvatemalo kaj Kostariko, la fina celo estus starigi indiĝenan tutmondan turismagentejon estrata de indiĝenoj, uzante la mondan reton kiun Indiĝenaj Dialogoj kreis dum sia plurjara kontentiga funkciado.

*Ĉu vi ofte organizis tiajn ekskursojn?*

Unuafoje en 2006 en Gvatemalo kun grupo de 8 personoj. Preskaŭ ĉiuj promesis partopreni la venontan vojaĝon en Kostariko kiu finfine okazis en 2008.

Du aliaj vojaĝoj okazis en Gvatemalo

kaj en julio la ekskurso de la UK kiu okazos en Gvatemalo jam allogis 14 personojn.

*Ĉu tio enkadriĝas en la projekto «indiĝenaj popoloj»?*

Jes kaj ne. *Indiĝenaj*

*Popoloj* estas pro-

jekto nek strukturita nek financata. Ĝi simbolicas la intencon de homoj kiel mi kiuj deziras ke *Indiĝenaj Dialogoj* havu sekvon. Mi ne tute rezignaciis pri malapero de *Indiĝenaj Dialogoj* ĉar la koncepto « dialogoj » estas la plej alloga vortumo kaj krome ĝi ekzistas laŭleĝe en Nederlando, kio kostis sufiĉe multe. Eble la fenikso renaskiĝos el siaj cindroj kiam la tempo estos forgesiginta la vundojn.

*Kio estas via plej bona memoraĵo pri tiuj ekskursoj?*

Kiel diris Gabriel Garcia Marquez « ĉiuj fokusiĝas al la pinto de la montaro sen scii ke la vera feliĉo konsistas en la maniero laŭ kiu oni grimpas la deklivon ».

Mi havas la impreson ke tiuj kiuj partoprenis la iom aventuremajn ekskursojn kiujn mi organizis sentis sin poste pli proksimaj al la filozofio de Gabriel Garcia Marquez kaj kelkaj eĉ faris pli ol ili supozis ke ili kapablas fari,







sendistinge ĉu ili fingrimpis la vulkanon aŭ ne. Krome ili turismas kun la duobla kontentigo ke ili kontribuas al la diskonigo de Esperanto kaj utilas per la solidara agado. Helpi homojn senti sin feliĉaj kaj utilaj estas feliĉige. Unu el miaj plej ŝatataj devizoj estas «Ili ne sciis ke ĝi estas neebla, do ili ĝin faris.»

Iam sinjorino diris al mi fine de vojaĝo, ke ŝi sentas sin pli sana kaj ke ŝi fizike plenumis agojn kiujn ŝi ne imagis sin kapabla plenumi. Belege. Ŝi partoprenis duafoje la vojaĝon en Gvatemalo! Kiam kuniĝas esperantistoj lokaj, indiĝenaj, turismemaj komunikante per Esperanto kaj realigante iagrade la revon de Zamenhoj kaj la antaŭvidon de Jules Verne, mi sentas min feliĉe emociigita.

### *Kaj la plej malbona ?*

Ĝenerale mi forgesas la negativajn spertojn. Kvankam mi estas malstreĉiĝemulo, mi iam sentis angoron okaze de la unua vojaĝo kiun mi organizis sen vere sperti pri turismo profesia. Estis planita tranokto kun la grupo en la «montara ŝipo « kiun mi konstru(ig)is kun vidado al la lago Atitlan. Kiam ni atingis fine de posttagmezo la ŝipon, kelkaj ĉambroj ankoraŭ ne havis pordojn! La indiĝenoj kiuj laboris al la konstruado malfruis je pluraj tagoj sed sukcesis malsenpordigi la ŝipon je noktiĝo.

Dumnokte ekblovegis la vento kaj la ŝipo laŭtege grincis, knaris, kriis, blekis kiel antaŭ ŝiprompiĝo. La nokton mi pasigis senripoze taksante la fiaskon kaj promesante min ke mi neniam plu turisman vojaĝon organizos. Matenmanĝe je mia surprizo ĉiuj

bonhumoris...La vivo estas sinsekvo de iluzioj kaj seniluzioj.

### *Ĉu vi ankaŭ estis en Kubo?*

Jes, okaze de konferenco en 1988 kaj de Universala Kongreso en 1990.

### *Viaj impresoj ?*

La kolonia arkitekturo de La Havano nemakulita de reklamaĵoj favore impresis min.

Ĉar estis malpermesite loĝi ĉe la loĝantoj kaj monŝanĝi kun ili mi faris ĝin! Post kelkaj tagoj venis policistoj kiuj enkarcerigis min. Mi devas konfesi ke estis la plej kleraj, bone edukitaj, respektemaj policistoj kaj la plej komforta malliberejo kiujn mi frekventis en tuta Latinameriko (1).

### *Sed ĉu la kubanoj kiuj gastigis vin ne havis pli da problemoj ol vi ?*

Eble, mi supozas ke verŝajne ili devis pagi monpunon.

Unu tagon poste, en la prezidenta palaco, mi estis manpremanta kaj ŝercanta kun la Soldato de Esperanto, Fidel Castro. La vivo estas sinsekvo de iluzioj kaj seniluzioj...

### *Ĉu ankaŭ tie la esperantistoj havas kontaktojn kun la indiĝenaj popoloj ?*

Laŭ la Soldato, en Kubo estas nek blankuloj, nek nigruloj, nek indiĝenoj, nur kubanoj. Mi opinias ke la indiĝenoj malmultas en Kubo pro mortigo dum la konkero far la hispanoj.

### *Aŭ ĉu pro asimiliĝo, kunfandiĝo en la tutan kuban popolon ?*

Eble, sed estas malgranda procentaĵo da mestizoj en Kubo. En mia memoro estas malfacile trovi kuban vizaĝon kiu atestas pri indiĝena deveno.

### *Kaj viaj nunaj planoj (krom la ekskurso antaŭ UK) ?*

Organizi vojaĝon en Gvatemalo kaj Kostariko en januaro/februaro 2011, lasante iom post iom la organizadon al la indiĝenoj. Mi ŝatus iam ampleksigi tiun agadon ekzemple en Burkina Faso kie estis bonaj kontaktoj okaze de du kursoj de Indiĝenaj Dialogoj aŭ en Rusio kie mi partoprenis kurson de Indiĝenaj Dialogoj por indiĝenoj el pluraj respublikoj.



Tiuj kiuj pretus aventurumi -sen aĝa diskriminacio- en Gvatemalo aŭ Kostariko aŭ stipendii junan indiĝeninon, bonvolu kontakti min :

Philippe Chavignon, M.F. du Plan 06470 Guillaumes Tél. 04 93 05 51 98 werphatao@hotmail.com

*(1) Enkarcerigon mi trafis ankaŭ en Argentino kaj Brazilo sed neniam pli ol 24 horoj. Ankaŭ memvole en Peruo. Estis interesa sperto.*



# Vizito de kubanoj en Saulxures-sur-Moselotte kaj Gérardmer

**E**stis la 21a de oktobro 2009. Kun granda ĝojo, mi bonvenigis Yoandran kaj Norberton ĉe la stacidomo de Kruth. Ili venis de Riom apud Clermond-Ferrand post longa trajn-vojaĝo. Jam noktis. Ili jam turneis en Eŭropo ekde la 19a de septembro, tamen, malgraŭ ke dum unu monato ili jam renkontis multajn homojn kaj multajn urbojn, vilaĝojn, pejzaĝojn, ili gapis al ĉio kvazaŭ estus la unua tago, kun freŝa rigardo. Ili ŝatis ĉion, gustumis ĉion, interesiĝis pri ĉio.



Por Yoandra, estis la unua vojaĝo ekster Kubo. Norberto spertis nur dektagan vojaĝon en Montpellier en 1998, do ankaŭ li estis preskaŭ virga koncerne la konon de Eŭropo.

Tre agrablaj estis por mi kaj ili la trinokta kaj dutaga restado. Ĉiuj tagoj estis plenaj de preskaŭ seninterrompaj babiladoj kaj reciprokaj informoj pri la vivo en Kubo kaj la vivo en Vogejoj.

Kompreneble ankaŭ okazis pied-promenadoj en Saulxures kaj sur la rando de la lago en Gérardmer.

Tre fortaj momentoj estis la renkonto kun grupoj. En la teknika lernejo de Saulxures, venis du klasoj de gejunuloj kaj kelkaj adoltoj. La publiko estis tre atentema, eĉ la kutime bolanta junularo estis kaptita de la fotoj, filmetoj, komentoj, kiujn Norberto prezentis. Ankaŭ la deklamado de poemo far

Yoandra tre plaĉis. Poste venis diversaj demandoj, ankaŭ de la gejunuloj. Norberto kaj Yoandra ne laciĝas respondi, ju pli da demandoj, des pli da intereso de la publiko por Kubo, do ili tre afable respondas. La plej interesataj personoj restis pliajn momentojn kaj mi mem ne laciĝis traduki.

En Gérardmer, ni unue faris festeneton ĉe la klubanino Henriette. Ĉiu el ni alportis ion por manĝi kaj la etoso estis ege bonega. Poste venis la prezentado de Kubo en la kultur-domo. La publiko estis iom malpli multnombra kaj malpli juna ol en Saulxures, tamen plejparte ili jam spertis en la lingvo, do ofte komprenis la diritaĵojn antaŭ mia traduko, pro tio ili ĝuis ricevi dufoje la informon. La demandoj longe daŭris kaj estis nekredible variaj, mi mem eksciis pri aferoj, kiuj ne estis aluditaj ĉe mi, eĉ post du tagoj de senĉesa babilado.

Rakonti pri Kubo estus tro longe. Ĉefe interesis min la fakto, ke ili daŭre vivas en komunisma sistemo, kun la avantaĝoj kaj la malavantaĝoj. La senlaboreco ne ekzistas. Ĉiu familio ricevas en januaro kajereton kun la priskribo de la manĝoj aŭ bazaj produktoj, kiujn ili rajtas ricevi kun tre malmultekosta prezo (preskaŭ senpaga), pro tio neniu vere mortmal-satas en Kubo, tamen ofte ĉe la mezo de la monato, la nombro de krucoj sur la kajereto montras elĉerpon de la rajto peti pli multe kaj ili devas aĉeti pli koste la nutraĵon ĝis la fino de la monato. Aliflanke la listo de bazaj produktoj skribitaj sur la

kajereto ne donas grandan variecon en la menuo.

La instruado kaj la san-servoj estas bone zorgitaj kaj senpagaj.

Eliri el Kubo por vojaĝi eksterlande praktike ne eblas, se vi ne ricevas inviton de iu eksterlandano kaj plie la permeson de la registaro.


Mi diris «Do pro kio Esperanto, se vi ne povas eliri el via lando nek posedi intereton?» (nur entreprenoj povas retumi, kun la permeso de la registaro). Norberto respondis «Por eskapi de la rutino. Jam bone, vojaĝi en nia propra lando, de unu grupo al alia grupo».

En popolo, kiu atingas preskaŭ 11 milionojn da loĝantoj, la esperanto-movado estas tre vigla. 700 personoj pagas kotizon. Tio estas bela rezulto, en lando kie oni havas monon nur por vivteni sin.

Norberto kaj Yoandra povas fari tiun vojaĝon nur pro kolekto de mono fare de la eŭropaj amikoj kaj esperanto-asocioj. Ili ne ricevas monon de Kubo.

La homoj, kiuj venos en Kubon, ricevos vizon sen probleme kaj rapide (proksimume 30 eŭroj). Ĉiuj eksterlandanoj estas varme bonvenigitaj, ĉar Kubo parte vivas per turismo kaj ĝi estas tre bela alloga lando. Ne hezitu viziti Kubon!

Ginette Martin



## Komitato de UFE

# Decidaro de la Komitatkunsido je 31a de januaro 2010

**T**io ĉi NE estas raporto pri nia Komitatkunsido. Estas simpla eta decidaro, konkludaro de tiu kunsido, uzebla de vi plusendocele, informcele al viaj samfederacianoj ks.

### Estis kelkaj PETOJ fari-taj al Komitatanoj

1. Sendi RIB-n (bankkonton kaj BIC kaj IBAN-numerojn) cele pli faciligi, rapidigi la repagojn.

2. Reprezentantoj de Federacioj prizorgu - aŭ instigu sian Federacion fari - la 2an «relance» en la jaro, kontaktante retpoŝte au telefone ĉiujn ne-realiĝintojn. Se vi scias pri mortintoj kaj ĝenerale pri adresŝanĝoj, bv. sciigi ilin al la Sidejo kopie al la Estraro.

3. Reprezentantoj de Federacioj sendu aŭ sendigu la Jaran Raporton de la koncerna Federacio.

4. Se vi scias pri onta vojaĝo al Francio de eksterlanda esperantisto, proponu al Yves Nicolas organizi preleg-turneon tra Francio. Porinforme 2 grandaj prelegvojaĝoj estas aranĝataj jare. Prelegvojaĝoj estu pli vaste diskonigataj.

### Estis pluraj INFORMOJ sciigiitaj

1. Nova banko. De nun mono ĝirendas al nia konto ĉe la NEF. RIB havebla laŭ simpla peto al la Kasisto.

2. Kontrakto de Susanna. Laborposteno ŝanĝita de «kunordigantino» al «responsulino de la sidejo».

3. Nova reta informletero Esperanto Aktiv aboninda je <http://esperanto-jeunes.org/verda-krabo>.

4. Agenda 21. Slipujo estis farita dank'al subvencio ricevita, sliparo estas verkota.

5. Kaiserslautern 2010. Pli ol 75 homoj el Francio aliĝis. Kvorumo estos por la Komitatkunsido. Estos bonega kongreso, kun allogaj ekskursoj, agrabla kadro. Bonvenon al ĉiuj !

6. Interasocia Renkontiĝo 2011. Preparoj bone antaŭeniras. 4 asocioj kunlaboras kaj -financas la aranĝon : la Federacio Langvedoko-Rusiljono, Espéranto-France, SAT-Amikaro kaj la Franca Fervojista Esperanto-Asocio (FFEA).

7. UK 2015 en Lille. La Nordfrancia Esperanto-Federacio kandidatiĝis. Aprobo de Espéranto-France estos oficiale voĉdonata dum la Komitatkunsido en majo aŭ septembro.

8. Eta Princo. Prepar-laboro bone antaŭeniras, ĉefe kun la kanada Eo-asocio, malpli glate kun la aŭtorrajto-posedanto, la eldonejo Gallimard.

### Estis pluraj DECIDOJ alprenitaj

1. Klubo 2000 por la jaro 2009-

2010. Financota estas la agado «Peticio», interasocie prizorgota kun SAT Amikaro. Laborgrupo flanke de EF konsistas el Jeanne-Marie Cash, Claude Longue-Épée, Guy Camy (kaj Philippe Chavignon).

3. Eksteraj Rilato. Enketo estos referata ĉi-jare.

4. Staĝoj por instruistoj. Informoj pri okazontaj staĝoj estos dissendataj, estos proponataj staĝoj en ontaj regionaj kunvenoj (Anne Jausions kaj Renée Triolle).

5. Kunlaboro kun la MCE Grésillon. Espéranto-France havu reprezentanton en la Komitato. Ni demandas al unu el la nunaj societanoj, ofta partoprenanto de la MCE-kunsidoj, ĉu ŝli bonvolas iĝi tiu reprezentanto de la asocio. Ne valida decido, pro ne plu kvoruma Komitato.

### Pluraj LABOROJ ekitaĵ

1. Serĉado de novaj Komitatanoj kaj Estraranoj. La tiucela Komisiono ekserĉis homojn, trarigardante liston de membroj, elektis kelkajn kontaktindajn kaj dividis la liston inter komisionanoj.

2. Malnetaj kontoj estis prezentitaj, ili estos plu ellaborataj, propono de buĝeto estos sendata al la Komitato antaŭ sendo al la membraro de la Jara kaj Financa raporto.



Renkontiĝo por gejunuloj

## MIREGE 2 en Bulgario

**M**IREGE 2010 okazos je la 21-28/08/2010 en Polski Trambeŝ (Bulgario).

MIREGE estas internacia eŭropa renkontiĝo por gejunuloj inter 13/17 jaraĝaj. Kiel en MIREGE 2009 en Baugé (Francio, 49) estas petita subvencio enkadre de eŭropa programo « Jeunesse en Action ». Respondekas pri la renkontiĝo Mariana Gencheva. Diversaj artaj aktivaĵoj (muziko, pentrado, kantado, dancado, turismo) estos proponataj al la gejunuloj. Devus partopreni kvar landoj, Italio, Hungario, Bulgario kaj Francio, kaj po 6 gejunuloj lande. Por kompletigi la francan junan skipon, ni ŝatus aldoni 2 aliajn gejunulojn inter 13/17 jaraĝaj.

Akompanos la gejunulojn Jannick Huet-Schumann el Rennes kaj Franjo Lévêque/Guy Martin el San-Briego.

Trapasi la somerfinon en Bulgario inter eŭropaj gejunuloj en esperanta medio estas vere bona ideo.

Alklaku la ĉi-suban ligon kaj vizitu la lokon de la renkontiĝo.

[www.lesopark-bg.com/index\\_en.php](http://www.lesopark-bg.com/index_en.php)

Por scii pli kontaktu :

Franjo Lévêque - Guy Martin  
09 53 92 77 37 - 06 76 27 51 78  
[leveque.franjo@gmail.com](mailto:leveque.franjo@gmail.com)  
aŭ

Jannick Huet-Schumann  
02 99 83 69 86  
[jannick.huet@free.fr](mailto:jannick.huet@free.fr)

Interrete

## Sukcesa Monato de Vikipedio

**L**a Esperanto-vikipedio ricevis rekonon pro la plej granda kresko de la mil « havendaj artikoloj » dum la pasinta monato aprilo 2010. En tiu listo enestas la temoj, kiuj, laŭ la vikipedio-kunlaborantoj nepre enestu en ĉiu vikipedio. Partoprenas ankaŭ Esperanto, inter entute 18 lingvoj.

artikoloj en unuopaj vikipedioj, [http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles/Growth#eo\\_Esperanto](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles/Growth#eo_Esperanto). En komparo kun la aliaj lingvoj, Esperanto antaŭeniris dum aprilo de la 37-a loko al la 33-a, [http://meta.wikimedia.org/wiki/List\\_of\\_Wikipedias\\_by\\_sample\\_of\\_articles](http://meta.wikimedia.org/wiki/List_of_Wikipedias_by_sample_of_articles).

Tiu kresko estas la plej videbla sukceso de la ĵusa Monato de Vikipedio, kiun survoĵigis Marek Blahuš kadre de E@I. Akompanis la kampanjon konkurso, en kiu partoprenis entute 28 vikipediaj kunlaborantoj. La rezulton de la konkurso oni aperigos fine de majo.

Jen la listo de la mil havendaj artikoloj, [http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo\\_de\\_havendaj\\_artikoloj](http://eo.wikipedia.org/wiki/Vikipedio:Listo_de_havendaj_artikoloj), pri kies konsisto certe eblas senfine diskuti...

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand,  
<http://www.esperantoland.org>

en bref ● mallonge

● ADIAŬO

*Nia amiko Raymond Boré, komisiito de UEA pri Zamenhof/Esperanto-objektoj (ZEO-j), forpasis la 6-an de februaro en Chambéry. En sia hejmurbo, li atingis decidon de la urbaj instancoj nomi la placon, ĉe kiu li loĝis, Skvaro Zamenhof. Pro liaj meritoj la Estraro de UEA ĉi-jare premiis lin per Diplomo pri Elstara Agado, sed la sorto ne permesis transdoni ĝin al li. Eble li ne konsciis, ke mi ofte parolas pri li nerekte. Foje estis jarraporto de UFE, en kiu iu persono raportis per unu-du paĝoj pri unu letero sendita al iu gravulo, dume en la sama raporto, la laboro de Raymond Boré, nome sendo de 400 leteroj al diversaj instancoj, estis raportita per unu linio... Raymond Boré estis modesta sed senlaca esperantisto, fidela membro de UFE kaj de UEA. Laŭ Kristian Garino, la lastaj vortoj de Raymond Boré estis: «L'espéranto a été mon grand soleil».*

● LA SVISA MUZEO DE LUDOJ PROPONAS VIZITOJN EN ESPERANTO

*La Svisa Muzeo de Ludoj konsentis aldoni Esperanton inter la lingvoj elekteblaj por vizitoj kaj laborgrupoj.*

*La Muzeo, en mezepoka kastelo, konservas ĉarmegajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj (Barato, Afriko, Ĉinujo, ktp.). La Muzeo de Ludoj estas atingebla per 5-10 minuta promenado el la stacidomo de la urbeto La Tour-de-Peilz (Laturdepe), apud Vevey (Veve).*

*Vizito en Esperanto de la Muzeo de Ludoj estis rezervita por dimanĉo la 6an de junio.*

(Cesco Reale)



Esperanto estas nun en la unua loko menciata sur la paĝo, kie oni sekvas la plej grandajn kreskojn de tiuj

## Komitato de UFE

# Laborkunveno pri “ kio limigas la kreskon de loka esperanta klubo “ ?

**D**ekdu personoj kunvenis en la sidejo de Esperanto-France la 26an de septembro 2009 por komune studi kaj pripensi tion, kio limigas la kreskon de loka klubo.

Partoprenantoj unue ricevis po 4 kartonajn folietojn, sur kiujn ili devis skribi frazon, kiu vortumas iun kialon.

La gvidanto poste kolektis ĉiujn kartojn, miksis ilin kaj redonis po 4 al la partoprenantoj. Tiuj rajtis senbalastiĝi de la malplej ŝatata karto.

Ili poste devis interŝanĝi unu kun sia najbaro.

Grupitaj po 3, ĉiuj tri partoprenantoj de ĉiuj grupoj bezonis iom da tempo por interkonsenti pri la 3 plej gravaj kaŭzoj kiuj kuŝis fronte al si.

Tiam restis 12 kartoj.

La gvidanto kolektis la kartojn por glui ilin sur la tabulon, petante rilaton « kaŭzo-efiko » inter ili. Post longa laboro kaj pridemandado de la klareco, ekzisto, rilato inter frazoj, la grupo komune alvenis al la pre-

zentita arbo pri la nuntempa realo de loka klubo.

Por legi la arbon, konsideru ke ĝi komenciĝas ĉe la bazo. Ĉe la komenco de la sago, legu « Se » kaj aliflanke « do ». Ekzemple, se « la klubo ne taŭge instruas », do « ne venas/restas novuloj ».

« Esperanto ne havas komercan valoron » oni konsideris kaŭzo pri kiu loka klubo povas nenion. Ĝi estas ekstera kondiĉo, kiu influas lokan klubon.

Tiu reto de kaŭzoj/efikoj montras ke **loka klubo devas krei, ŝanĝiĝi kaj proponi ion al lernintoj**. Se ĝi tion ne faras, ĝi estas nur fabriko de lernintoj, kiuj **poste malaperos aŭ mucidados en la estraro**.

Kion ŝanĝi por inversigi ĉiujn efikojn ?

Facilas ŝanĝi unu ne-deziratan efikon al dezirata. Temas pri bonvenigo de eksterlandanoj. La grupo konsciiĝas ke alveno de eksterlandanoj :



- diversigos la lokajn aranĝojn,
- kreos pli interesan etoson,
- allogos kaj konservos esperanto-parolantojn,
- instigos al renoviĝo de la estraro, kiu en si mem, diversigos lokajn aranĝojn.

Okazigi kunvenon **ne en la klubo sed aliloke** rompas la kutimon « Loka klubo renkontiĝas en klubo ». Kial ne renkontiĝi aliloke, en publika loko, en kafejo ?

Cyrille Hurstel

## Anniversaire

# L'art de travailler ensemble

**A**l'occasion du 70<sup>ème</sup> anniversaire du Pr Humphrey Tonkin, le président de l'UEA, Probal Dasgupta, a remis à l'éminent professeur un livre de plus de 900 pages spécialement édité en son honneur par l'UEA, *La arto labori kune*, l'art de travailler ensemble. Travailler ensemble, ce fut certainement la devise, chère au cœur du récipiendaire, qui a permis de mener à bien la production de cet ouvrage. Sous

la rédaction du Dr Detlev Blanke et du Dr Ulrich Lins, pas moins



d'une centaine de collaborateurs y ont participé. Etaient présents lors de la cérémonie au siège de l'association à Rotterdam le bureau de l'UEA au complet, le président de l'Académie d'Espéranto et de nombreux amis venus parfois de loin pour participer à cette grande fête.



Kulturcentro de Esperanto

## Actualités de la MCE au château de Grésillon

**A**près une année difficile, le château de Grésillon prépare sa saison 2010. Sur une durée malheureusement réduite (17 juillet au 14 août), il accueille des professeurs de différents pays pour permettre à tous les stagiaires de se familiariser avec la pratique orale de l'espéranto. Tomasz Chmielik invite tous les bons espérantistes francophones à traduire en espéranto les articles qu'Edmond Privat a publiés dans la presse suisse. Le programme inclut également des activités, de la chanson à l'astronomie, avec en particulier une semaine théâtrale. Georgo Handzlik, après sa tournée en Amérique du Sud, offrira trois représentations de sa pièce Ludoviko Lazaro, créée pour le 150<sup>e</sup> anniversaire de la naissance de Zamenhof.

Tous les détails sont disponibles sur le site [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org). Par ailleurs, des experts professionnels ont visité le château en mars pour étudier les rénovations à envisager. Il n'y a pas de grosses réparations à prévoir dans l'immédiat, mais il faut chauffer l'ensemble du château pour pouvoir l'utiliser toute l'année, augmenter le nombre de douches et commencer à en installer à l'intérieur de certaines chambres, concevoir des escaliers supplémentaires pour avoir le droit de réutiliser le deuxième étage. Le seul fait d'aplanir certaines portions du terrain autour du château le rendrait mieux adapté à des événements en plein air. Des propositions concrètes seront discutées lors de l'Assemblée Générale du 29 mai prochain.

François Lo Jacomo

## KIAL ESPERANTO HAVAS NATURAN LIGON KUN DAŬRIPOVA EVOLUIGO ?

**D**e 2008, Espéranto-France agas por Esperanto laŭ gvidlinioj de Agendo 21 kaj instigas aliajn asociojn kaj ĉiujn Esperanto-parolantojn agi cele al daŭripova evoluigo.

Tamen, kelkaj esperantistoj ne tuj vidas ligon inter Esperanto kaj daŭripova evoluigo. Tial ni provas regule informi en tiuj kolumnoj pri nia agado kaj prezenti la antaŭeniron de la projekto.

Jen kelkaj klarigoj kiuj aperas ĉe la kovrilpaĝo laste eldonita por ricevi la sliparon (vidu LME 573).

Esperanto povas faciligi daŭripovan evoluigon sur diversaj niveloj :

**Demokratio** : Esperanto ebligas pli facilan partoprenon en ĉiaj internaciaj debatoj ;

**Egaleco** : Esperanto estas la plej facile

alirebla lingvo por ĉiuj ;

**Kulturo** : Esperanto kontribuas al proksimigo de ĉiuj kulturoj kaj al naskiĝo de planeda identeco ;

**Ekonomio** : Esperanto faciligas egalrajtecan komercon, respektaman internacian regmanieron kaj povas ŝparigi parton de tradukelspezoj en internaciaj organizaĵoj aŭ kunvenoj.

Vi certe konas plurajn ekzemplojn de agadoj kaj iniciatoj en Esperantio tute kongruaj kun tiuj kampoj. Se vi pretas redakti kelkajn liniojn pri ili, bonvolu sendi la artikolon al la redakcio cele al aperigo de dosiero pri la temo en estonta Le Monde de l'Espéranto. Eblas trakti ekzemplojn en iu ajn lando, nura kondiĉo estu ligo kun Esperanto.

Pensu monde, agu loke, parolu Esperante !

## en bref ● mallonge

### ● NOVAĴOJ DE AFRIKO

*En Afriko, la esperanto-movado vivas. Ĝi kreskas vigle, impete kaj foje senorde, la branĉoj rapide kreskantaj sin interkruciĝas, tiel ke estas kelkfoje malfacile scii kiu estas kie kaj kiu faras kion.*

*En bulteno Afrika solidareco de Esperanto-France, mi du-tri-foje jare disvastigas kelkajn projektojn kaj agadojn kiuj bezonas financan aŭ alian helpo de eŭropaj esperantistoj.*

*En ĝi, mi ne parolos pri la homhelpa agado por disvolvado de Afriko, en kiuj esperantistoj estas envolvitaj ! Tio povus esti temo de tute alia artikolo, eĉ eseo.*

*Mi rakontas nur pri asocioj kaj agadoj kiuj celas disvastigi Esperanton kaj kiuj ofte bezonas financan subtenon de eksterlando.*

*La bulteno legeblas ĉe <http://sudio.pireneoj.free.fr/insuleto/BultenoAf-Solidareco.aprilo2010.pdf>*

*Por helpi, jen du manieroj :*

*1/ rekte sendi petitan materialon aŭ monon al la koncernaj adresoj ;*

*2/ sendi monon al UFE kun mencio por Esperanto en Afriko. Tia donaco rajtigas vin je imposta atesto kaj vi povos dedukti 66 % de la sumo de via imposto.*

Jeanne-Marie Cash

### ● EDUKADO.NET

*Grandan dankon pro via malavara subteno, donacita por la rekonstruo de la porinstruista paĝaro [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La kolektado kaj la konstrulaboroj progresas bone. Ni kontentas kaj faros ĉion eblan por krei la plej modernan kaj plej riĉan Esperanto-portalon, pri kiuj ankaŭ vi povos esti fieraj. Granda parto de la raporto aperas publike sur la paĝaro (<http://www.edukado.net/pagina/Subtenu+nin%21/14097/>).*

Katalin Kováts

Agenda 21

## Kulturcentro de Esperanto

# Utiliser l'espéranto au quotidien à Kvinpetalo

**N** L'article suivant a été écrit par les participants du stage d'espéranto qui a eu lieu du 24 au 27 février 2010.

Kvinpetalo se situe au centre ouest de la France, dans le village de Bouresse, à 40 km au sud de Poitiers et à 12 km de Lussac-les-Châteaux, dans la Vienne. Bouresse est une commune à vocation agricole depuis l'origine comme l'indique son nom (Bouresse vient de bœuf), mais elle est connue aujourd'hui grâce à Kvinpetalo. C'est là, dans un cadre agréable et accueillant, que Philippe, Odile, Gilles, Florence, Lucette, Gilbert (dit Tom) et Ali ont suivi un stage de quatre jours (24-27 février 2010), animé par Anne-Sophie Markov.

Non, le nom Kvinpetalo n'est pas celui d'une fleur nouvellement découverte (comme pourrait le faire penser le logo de l'association), mais le groupement, autour d'une cour centrale, de cinq (kvin) maisonnettes campagnardes. Kvinpetalo est un centre culturel, de stages et d'étude fondé en 1985 et fonctionnant selon les principes associatifs de la loi de 1901. Il possède 14 chambres, une salle à manger et 3 salles de classe ainsi qu'une bibliothèque qui, outre ses propres acquisitions, possède de riches collections héritées d'espérantistes de renom, entre autres Gaston Waringhien et Roger Bernard. Tous ces documents sont consultables sur place. Kvinpetalo a mis également à la disposition des stagiaires un service de librairie, par lequel ils ont pu acquérir des publications en espéranto, y compris parmi les plus récentes. Apprendre, parfaire son élocution, pratiquer, discuter ont été les maîtres mots de ce stage, la pratique de la langue ayant été constante dans toutes les

situations. Pendant ce stage, le travail était sérieux et intense, (ce qui ne signifie pas que l'on n'y riait jamais, bien au contraire !). A chaque stage il est possible de passer les examens officiels de FEI. Ce qu'ont fait (avec succès) quatre d'entre nous, l'examen ayant été organisé et encadré par Claude Nourmont et Brian Moon (président du conseil d'administration). Kvinpetalo organise non seulement des stages d'étude de la langue espéranto et des divers aspects

a assumé (bénévolement) pendant le stage les tâches relatives au fonctionnement du centre et n'a cessé de se soucier de notre « confort », ainsi que Oliver Le Guen, qui a veillé à nous assurer des repas de grande qualité, succulents, variés et... copieux et à qui nous souhaitons beaucoup de succès dans sa nouvelle et originale entreprise de restauration.

## Le point de vue de Tom

J'ai bien sûr participé à beaucoup de stages, ou de séminaires. Aucun, de près ou de loin, ne ressemble à ce que j'ai vécu à Kvinpetalo. La qualité de l'enseignement d'abord – qualité qui a fait l'unanimité de tous les stagiaires [1] – pas seulement de la langue elle-même, bien que j'aie fait des progrès inattendus [2], mais aussi des nombreux et différents éclairages sur la littérature et

les organisations espérantistes. Encore merci Anne-Sophie.

Il y a eu aussi autre chose. Peut-être qu'il me reste l'enthousiasme des nouveaux « convertis », mais je n'ai jamais rencontré une telle ambiance où se nouaient spontanément des relations amicales et confiantes entre les participants. Est-ce parce que toutes les personnes présentes partagent, chacune à sa manière, le même espoir, la même conviction ? J'aime le croire. En tout cas, on ne vient pas à Bouresse si la cause de l'espéranto vous laisse indifférent.

Ou alors, on y vient pour écouter Florence chanter et trouver son pain frais au petit déjeuner !

### Notes

[1] Et le premier (ou la première) qui dit que je suis un flatteur, il est mort...

[2] Voir la note ci-dessus.



de sa culture, mais il existe aussi des stages thématiques en espéranto, dans les disciplines les plus diverses (ainsi, un stage de jardinage a eu lieu mi-avril et un stage de musique aura lieu en août, avec la participation de la famille Markov).

## Des repas de grande qualité

S'il vous reste un peu de temps libre, vous pourrez toujours (à l'heure de la sieste) visiter, dans le village et à proximité, l'église romane classée Notre Dame, datant du XII<sup>ème</sup> siècle, et son portail orné de voussures à claveaux, le donjon de la Rigaudière (privé), vestige de fortifications médiévales du XV<sup>ème</sup> siècle et, dans le cimetière, d'anciennes tombes (dont celle d'un chevalier inconnu) ainsi qu'une croix monumentale. Nous devons grandement remercier Anny Le Guen, qui



# Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj... elegante, de antikva al moderna periodo

**P**er tiu libro, Gerrit Berveling liveras kolekton de mallongaj rakontoj de Louis Couperus, arigitaj laŭ tri malsamaj epokoj. Li klarigas en antaŭparolo, kiel Couperus (1863-1923) iĝis « senkon- teste ... unu el la plej gravaj aŭtoroj de la nederlanda lingvejo », brile verkante pri plej diversaj temoj kaj demandoj. Dum li ne estis tre ŝatata (tamen tre legata) siatempe, li glore famiĝis je sia vivfino. En siaj verkoj, li aparte interesiĝis pri la lasta periodo de la Romia Imperio, kiel vi vidos en la unua parto de ĉi libro. Li priskribas aventurojn dramajn laŭ vigla epopea stilo, spirhaltiga. Mi ŝatus legi pli ofte tiajn historiajn rakontojn, kun tiel libera kaj humura tono ! Tiam venas transiro al nova periodo, kun « La morto

de Vesta», en tragedia stilo. Interese, kiel Couperus kiel filmisto, scipovas redoni tiel malsamajn etosojn. Jam tenata de la stilo, vi tiam aliras duan parton, por sombra historio de Lukrezia Borgia, kies vivon akompanis tuta serio da murdoj kaj perfidoj pro potencavido de ŝia familio. Por la tria parto, Gerrit Berveling elektis rakontojn el la « moderna periodo », en kiuj Couperus liveras sukoplenajn detalojn pri burĝeca vivstilo, kun delikata ironio. Por fini venas alegorio pri ermito, kiu ne sukcesinte trovi saĝon, tamen ekvidas vantecon en sia serĉado kaj revenas al pli modestaj kaj utilaj celoj. Ĉiam elstaras Couperus pri la psikologio de la roluloj,

ankaŭ en ĉi lasta noveleto.

Por tradukaĵo devas pariĝi aŭtoro kaj tradukanto, sed rolas ankaŭ la celita lingvo, kvankam enorma kvanto da alilingva



literaturo estas tradukita al la franca, mi ofte preferas legi tradukojn per Esperanto, kiu tiel bone taŭgas por redoni stildiversecon. Ĉi tie, foje nur kelkaj neutilaj neologismoj altiris la rigardon, ĉar la stilo estas brila kaj sprita, kun aparta ritmo en ĉiu priskribita periodo. Eksterdube mi ne

hezitos kiam tradukas Gerrit Berveling.

MHD

*Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj, de Louis Couperus. Tradukis Gerrit Berveling. Eld. UEA 2008. 180p.*

## La fumado

**E**n libroservo dum kongreso antaŭ tri jaroj, tiu libro stakiĝis sur tablo. Meze de multaj aliaj, sed kun la aŭtoro apude, kio estas avantaĝo. Tamen tiam mi ne aĉetis ĝin, ĉar unue mi malofte fumas kaj due sentas min sufiĉe ĉirkaŭata de varbada etoso ! Mi do malkuraĝe evitis la aŭtoron. Sed feliĉe, ĝi finfine alvenis en nian bre- taron kaj mi ne bedaŭras la legadon, nur maltrafon de certe interesa renkontiĝo. Kiel karakterizi tiun libron ? Ĉu ĝi estas libro pri scienco, historio, kuracarto, psikologio ? Ĉu varbado kontraŭ tabako ? Ĉu kuracilo ? Ĉu teknika helpilo ? Fakte ĉio samtempe, ĉar en 230 paĝoj, Robert Molimard sukcesas levi multajn deman- dojn, starigitajn de tiuj fakoj kaj per frapaj argumentoj respondas al kelkaj el ili, almenaŭ tiel, ke oni pretas plu pripensi post la legado. Deirante el la propra sperto, R. Molimard klarigas kiel oni rapide sklaviĝas pro tabako, kaptite de kulturaj, historiaj,



ekonomiaj cirkonstancoj. Kiel grandskale oni mortas pro ĝi, cetere. Li listigas la parametrojn, kiuj malhelpas fumantojn, rezigni pri danĝera ludo. Ĉar temas ankaŭ pri ludo, ĉefe kun deziro. Kaj li analizas la diversajn specojn de plezuro kaj ties funkciadon. Estas pli facile kompreni poste, ke manieroj fumĉesi ne povas esti unudirektaj, sekve post priskribo de ciga- redo laŭ teknika kaj ĥemia vidpunkto, R. Molimard detale diskutas pri strategioj, racie, kiel pedagogo.

Ni revenu al la unua demando, kiel karakterizi tiun libron. Ĝi larĝe transiras la limojn kiujn oni imagas pro la titolo kaj la subtitolo («ĉu vi dezirus malfumadi ...?»). Oni povus ankaŭ paroli pri dependeco al io ajn sklaviga, ĉar la meĥanismo estas

simila, t.e. en nutraĵoj oni aldonas malsan- nigan salon, troan grasaĵon aŭ sukron kaj pligustigajn produktaĵojn, same kiel en cigaredoj oni aldonas amoniakon. Kaj do ĉu tiu libro ne estas politika eseo ankaŭ, ĉar post evidentigo de industria, ŝtata kaj kolektiva komplikeco, ĝi instigas al libereco sinteno, plene respondecaj agoj de socio, ia revolucia sinteno ? Fine ĝi estas ankaŭ filozofia eseo : «Homojn vivigas la deziro, ne ĝia plenumo, kiu signifas finon de la deziro». Eble la nura efika solvo estas edukiteco, scienca kono pri la meĥanismo de tabakismo aparte kaj dependeco ĝenerale. Eduko al libereco, jen bela programo. Vere, mi ne bedaŭras la legadon.

Menciindas, ke Robert Molimard mem tradukis sian libron al Esperanto, en klara, ellaborita kaj agrabla lingvo kaj ke nun senpage legeblas ambaŭ versioj (franca kaj esperantlingva) sur la interreto.

MHD

*La fumado, de Robert Molimard (Eld. Sides Ima, 2007). 230p*

# Muzikaj novaĵoj

**V**inilkosmo proponas virtualajn albumojn laŭ FLAC kaj mp3 formatoj en sia elŝutretejo. Virtuala albumo signifas albumon kiu ne estos aŭ ne plu estos eldonita sur fizika sonportilo (KD aŭ alia) kaj jen la du unuaj :

- « Revolucio en pajleraro » de Ale Kosabela, la fama argentina artisto (Alejandro Cossavella), aŭskultebla kaj elŝutebla ĉe [http://www.vinilkosmo-mp3.com/kosabela-porkoj-strika-tango-c-74\\_111.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/kosabela-porkoj-strika-tango-c-74_111.html),
- « 62 Minutoj », la unua rokverko de Persone, eldonita surkasede en 1987. La albumo estis ciferecigita kaj remastrigita dudek du jarojn poste kaj nun reeldonita virtuale ĉe [http://www.vinilkosmo-mp3.com/persone-c-74\\_107.html](http://www.vinilkosmo-mp3.com/persone-c-74_107.html).

La novaĵo ankaŭ estas ke por la albumoj kiuj ne plu disponeblas sur KD, Vinilkosmo proponas la saman kvaliton laŭ formato senperda « FLAC » kiu donas plenan kontentigon al la postulemaj muzikŝatantoj.

Do ne hezitu viziti amplekse la enhavon de la elŝutretejo [www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com).

## Afrika Kompilo : Vigla Muziko / Konga Espero / Mayoma kaj JoMo

En 1996, Vinilkosmo jam kunlaboris kun afrikaj artistoj ekzilitaj en Germanio kaj en Francio por Vinilkosmo-Kompil' Vol.2. En 2007, Vinilkosmo lanĉis la projekton Afrika Kompilo pere de alvoko al pluraj afrikaj esperantoartistoj el Kongo, Togolando kaj Madagaskaro kaj aliaj insuloj. Ni ricevis plurajn reagojn, sed malgraŭ la klopodoj, multaj povis alporti efektive eldoneblajn kontribuojn. Finfine en 2009 kun la starigo de la muzika projekto de Konga Espero, la kunlaboro inter Mayoma kaj JoMo kaj titoloj de Dido Fundu de Vigla Muziko, la Afrika Kompilo povis finfine efektiviĝi.

Ĝi kunigas du albumetojn, « Kiu

lingvo ? » (8 titoloj) de Konga Espero kaj « Mayoma kun JoMo Afrikumas » (7 titoloj) kaj 3 titoloj de la bando de Dido Fundu, Vigla Muziko. Ili estis miksitaj, mastrigitaj kaj kompilitaj en la Studio de la Trappe/Vinilkosmo sur sama disko sub la titolo Afrika Kompilo kaj eldonita de Vinilkosmo.

Tiu ĉi projekto efektiviĝis dank' al internacia solidareca interŝanĝo kaj kunlaboro inter artistoj, teknikistoj, grafikistoj, produktistoj kaj subtenaj amikoj el Kongo (Kinŝaso kaj ĉirkaŭaj urboj), Germanio, Hispanio kaj Francio (Donneville, Tournefeuille, Tuluzo kaj Parizo).

Por aŭskulti fragmenton aux rekte mendi, <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd100&lng=e>.

## Eterne Rima

Igor Wasilewski, alinome Eterne Rima, origine el Pollando kaj nunloĝanta en Tokio, esperantistiĝis en 2000, ĉarmita pro la beleco kaj karaktero de Esperanto.

Jam partopreninte en la « Elektronika



Kompilo » per la furora « Planedo Esperanto », Eterne Rima revenas kun tiu ĉi nova albumo, kvintesenca de pura krunka hiphopo moderna kaj de arenbio (R&B) en Esperanto.

« Samideano » estas la unua albumo en tiu ĝenro en Esperanto laŭ tre aktuala hiphopa stilo « Dirty South » (fisuda repo), fama el la sudaj ŝtatoj de Usono kaj kiu rapide disvastiĝas sur la tuta tergloblo. La repaj tekstoj temas pri mono kaj la vivo de la riĉuloj, la rilatoj inter viroj kaj virinoj kaj kelkaj viglaj kritikoj pri la mokuloj de Esperanto kaj pri la eternaj komencantoj !

Krome en la albumo estas 15 MP3-aj duoninstrumentaj titoloj por karaokeo kaj 6 bonusaj remiksaĵoj.

Por aŭskulti fragmenton aux rekte mendi, <http://www.vinilkosmo.com/?disc=vkkd101&lng=e>.

Floréal Martorell kaj Mark Eaton  
[vinilkosmo@esperanto.org](mailto:vinilkosmo@esperanto.org)

## En 2010 la literaturaj konkursoj okazos kiel en 2008 kaj 2009 ankaŭ en Esperanto

La Poezia kaj Arta Grupo de Rusiljono en Perpignan (Perpinjano, sud Francio) tradicie aljuĝas literaturajn premiojn franclingve, katalunlingve, okcitanlingve kaj hispanlingve.

En 2008, kreiĝis esperantlingvan premion honore al S-ro René Llech-Walter kiu forpasis 101 jaraĝa en januaro 2007. Li multe agadis en la esperanta movado kaj estis dum jaroj prezidanto de UFE. Krome li agadis ankaŭ en multaj lokaj asocioj en sia urbo Perpignan kaj subtenis la katalunan lingvon.

En 2009, pligrandiĝis la nombro da Premioj

kies partopreno eblas esperantlinve, nome la premioj « René Llech-Walter », « Isabelle Robert », « de Lernejoj » kadre de la « Poeziaj Ludoj » kaj la premio « Notre accent ». Por malkovri ilin kliku ĉe la flanko de la paĝo <http://sites.google.com/site/konkursojenperpignan>. Specialaj kondiĉoj por la afrika movado kaj la franclingvanoj.

En 2010, la plej grava premio nomiĝas nun « René kaj Colette Llech-Walter » Colette (1936-2010), filino de René, subtenis la asocion.

Maloŭte okazas ke ne-esperantista asocio organizas esperantajn premiojn. Gravas ke ni partoprenu kiel eble plej nombraj. Tiel la premioj fariĝos tradiciaj.

Jean-François PASSARELLA



## Pri Ukrainio kaj azova maro Per Esperanto en Francio

**M**i estas Kostjantyn Demianenko, ukraina sciencisto-iŝtiologo (kaj esperantisto samtempe) kaj sube mi iomete rakontos pri la aŭtovojaĝo, kiun ni kun mia edzino Jana realigis marte-aprile de 2009, laŭ afabla invito de Espéranto-France. Mi iris al diversaj urboj de Francio por prelegi per Esperanto pri tiuj aĵoj, pri kiuj mi spertas - pri ekologio kaj fiŝoj de Azova maro (kiujn mi esploras jam dum multaj jaroj), pri Ukrainio, ĝiaj tradicioj, rimarkindaĵoj kaj nuntempa vivo.

Ni elektis veturi per nia familia aŭto, ĉar evidentiĝis, ke por paro tiu veturmaniero estas la plej malmultekosta kaj krome ĝi plej bone taŭgas por memstare esplori landojn, en kiuj ni vojaĝas.



### La vojo

Vojoj en Ukrainio tradicie ne estas tre bonaj, sed post malvarma kaj neĝa vintro ili estis vere teruraj. Kompare kun la unua, nia dua vojpeco estis ripoziga. (...) Ni devas esprimi respekton al francaj vojoj, kiuj laŭ niaj impresoj eĉ en profunda naturo estas tre aŭ sufiĉe bonaj. Ni neniam trafis situacion en Francio, kiam vojo finiĝas per malvojo, per iu kampo aŭ arbaro. Mi ĝuis stiradon, kaj jen kaj jen spektis ĉirkaŭantajn belaĵojn. Ofte mem vojo estis tre bela. Precipe nin plezurigis montoj kaj rokoj de Mediteranea bordo.

Dum nia vojaĝo ni ne perdiĝis dank' al nia GPS-navigilo, kies voĉo estis kvazaŭ voĉo de nia tria virtuala amiko, kiu ĉie jam estis kaj preskaŭ ĉion konas pri la lando, kie ni estas novaj gastoj.

### Kelkaj rapidaj notoj pri nia vojaĝo en Francio

**Romans.** Vizito de muzeo de ŝuoj. Interesa ekskurso, kiu treege impresigis Janan. Prelego kaj vespermanĝo en la klubejo en amikema esperanta etoso.

**La Ciotat.** Prelego ankaŭ kun neesperantistoj; venis multaj profesiaj demandoj, ekzemple de Raphaële Leguen, vic-urbestrino de La Seyne - franca ĝemelurbo de mia urbo Berdjansko en Ukrainio. Vizito de La Seyne, antikvan vilaĝon Le Castellet kaj La Ciotat.

**Montferrier** (apud Montpellier). Survoje promeno en Martigues kaj Arles, vizito de la haveno de Palavas kaj spektado de belega koncerto de klasika muziko en Montpellier. Dum vespermanĝo mi unuan fojon gustumis ranon (rostitan). En Ukrainio, ranon oni opinias kvazaŭ nacia manĝaĵo de francoj. Ĉu vere? Ŝajnas ke ĉiu ĉe la tablo diris, ke neniam gustumis ranon. Mi ankaŭ ne diru, ke al mi tre plaĉis la manĝaĵo, sed almenaŭ nun mi sentas min pli franco, ol antaŭe.

**Villeneuve d'Aveyron.** Laŭvoje ni spektis impresan viadukton apud Millau. Ni promenadis en antikva Villeneuve, estis en Villefranche kaj vojaĝis por spekti belajn naturajn memorindaĵojn de la regiono. Mirinda ekskurso en persona muzeo de André (muzeo de malnovaj aĵoj).

**Ste-Foy-La-Grande.** Ni vizitis lernejon, kie en du infanaj grupoj ni rakontis pri Azova maro kaj Ukrainio. Estis



tre agrabla komunikiĝo, dum kiu mi vidis sinceran intereson de infanoj. Jen bonega sperto de uzo de Esperanto! Kaj poste vizito de la kastelo de Duras, de belega urbo Bordeaux kaj aĉeto de famaj francaj vinoj.

**St-Nazaire,** uzinte eblecon promeni en preterveturata Nantes, kiu forte impresis nin per belega arkitekturo. Samvespere ni veturis al la haveno kaj spektis noktajn lumojn.

**Vojaĝo laŭ la marbordo,** ni ekvidis salajn lagetojn kaj antikvan Guérande. Vespere en la domo de asocio okazis nia prelego por esperantistoj kaj neesperantistoj.

**St-Malo.** Laŭvoje haltis kaj iomete promenis en Rennes. Promeno en malnova parto de St-Malo. Kaj malfruvespere ni havis unuan fojon la okazon ekvidi kio estas alta tajdo. Neforgesebla impresoj! En Cancale ni gustumis iom da « fruktoj de la maro ».

**Mont-St-Michel.** Ni ekvidis belegan konstruaĵon kaj milojn da turistoj (nenie dum la tuta vojaĝo estis pli multe; mi povas imagi, kio okazas ĉi tie somere...). La saman tagon, ni malkovris Caen dank' al Yves. Tio, kion li sukcesis montri dum nur unu horo, lasis fortan impreson kaj deziron pli konatiĝi kun la urbo.

Kaj ni lasis gastigeman kaj jam ne tiom nekonatan Francion...

Se diri pri niaj plej fortaj impresoj...



### Urboj

Ni jam vizitis Francion dum antaŭaj jaroj. En la jaro 2007, dank' al afabla Aleks Kadar kiu konsentis ĉiĉeroni, mi konatiĝis kun famega Parizo kaj, pasintjare, ni kun Jana ekkonis hejmecon La Ciotat dank' al Renée Triolle. Sed ne eblas kompari tion, kion ni vidis pli frue, kun riĉa geografio de nia ĉi jara vojaĝo en Francio. Belegaj antikvaj urboj... Ili estas kvazaŭ vizaĝo de tiom diversa Francio.

Ankoraŭ unu miro, ni eksciis, ke multegaj historiaj monumentoj (kasteloj) en Francio estas privataj (en nia lando preskaŭ ĉiu historia monumento dame estas ŝtata). Mi ne povas diri ĉu tio estas bona aŭ ne, sed tiel estas, kaj estas ne tre kutima por ni.

### Vilaĝoj

Tio, kion oni nomas vilaĝo en Francio, ne estas la sama, kio estas vilaĝo en Ukrainio. En multaj malgrandaj vilaĝoj de Francio, ni trovis belegajn preĝejojn, oldajn belajn domojn, kiuj vidis kelkajn jarcentojn. Puraj kaj hejmece kvietaj ili kvazaŭ estas speciale kreitaj por trankvila, sana vivo kaj ripozo. Oni rakontis, ke multaj homoj, kiuj laboras en grandaj urboj, elektas apudajn vilaĝojn por loĝi, kaj mi komprenas ilin. Krom pli malmultekostan loĝadon ili havas puran aeron, liberon sen urba bruo, sen streĉa trafiko de granda urbo...

En Ukrainio, vilaĝoj estas pli kamparecaj, kun plejparte neasfaltitaj vojoj kaj unuetaĝaj domoj. Dum lastaj postsovetiaj jaroj, ankaŭ en tiuj ukrainiaj vilaĝoj oni komencis konstrui preĝejojn kaj jen kaj jen grandaj domoj de tiuj, kiuj havas monon kaj ŝatas loĝi tie, kie estas pli multe da freŝa aero, tie, kie eblas perdiĝi...

### Esperantistoj

Mi devas sincere diri pri tio, ke ĉie en urboj nin gastigis tre interesaj, amikemaj, aktivaj homoj, kies aktiveco kaj energio fortigas kaj varmigas esperantajn randojn. En nia vojaĝo ni multe studis pri tio, kiel estas organi-

zata komunikado en esperantaj kluboj, kiel oni instruas, kiel oni povas ripozi komune.

Esperanta movado en Francio vere bonŝancas pro tio, ke ĝi kiel socia movado estas subtenata de instancoj. Ekzemple en urboj, kie mi pli-malpli konstante vivas (Berdjansko, Donecko - sud-oriente de Ukrainio), ĉiam granda problemo estis kaj restas ricevi ejon por kunvenoj de esperanta klubo kaj esperantaj kursoj. Ĉiam ekzisto de ejo por esperanta klubo en urboj de Ukrainio estas granda sukceso kaj rezulto de individua laboro kaj personaj financaj rimedoj de iu aktivulo aŭ grupo de aktivuloj. Sed mi ne scias pri okazoj, kiam ekzemple iu urbeŝtato en Ukrainio permesus senpage uzi iun urban ejon por kunvenoj de esperanta klubo.

### Francaj vinoj kaj francaj fromaĝoj

Vinoj kaj fromaĝoj de Francio estas konataj por ukrainoj kiel tre kvalitataj kaj diversspecaj.

Certe ni devis gustumi kaj ion kunpreni al Ukrainio.

Ni eksciis, ke fromaĝoj estas aparta parto de manĝa procezo dum tagmanĝo. Nun ni povas konfirmi, ke fromaĝoj en Francio estas multegaj kaj multaj estas tre bongustaj. Plej plaĉis al ni fromaĝo «St Agur», kiu ni unuan fojon gustumis en Montferrier.

Vinoj de Francio estas mondfamaj kaj ni ne povis preteratenti eblecon gustumi ilin. Eblas konstati ke francaj vinoj estas tre bonaj kaj multoble pli multspecaj ol fromaĝoj. Sed plej ekplaĉis al ni duondolĉaj blankaj vinoj. Ni eksciis, ke ruĝan vinon en Francio oni povas drinki kun siropo.

Kaj ankoraŭ ni eksciis, ke matemmanĝo en Francio estas simbola, tute ne peza por la stomako...

### Ne teo, sed kafo

Ni trovis, ke en Francio oni tre-tre malofte trinkas teon. Oni preferas kafon, kaj tio estas nekutima afero por ni, ĉar ekzemple en nia hejmo la plej

ĉefa varmiga trinkaĵo estas teo. Eble pro tio, ke Ukrainio estas pli proksima al Azio...

### Maroj

Dum unu vojaĝo niaj manoj eksentis akvon de Mediteraneo, de Atlantiko kaj de Maniko. Tio ne estis miraklo, sed tio estis simbola, ĉar signis randojn de nia Eŭropa tero...



### Francaj kaj poŝtelefonoj

Ni rimarkis, ke en Francio nemultaj homoj uzas poŝtelefonojn. En Ukrainio estas male - poŝtelefonojn uzas ĉiuj. Multaj homoj havas po kelke da poŝtelefonoj, por paroli ene de diversaj telefonretoj. Eble tio okazas pro tio, ke telefoni tiunmaniere en Ukrainio kostas multoble malpli. Sed ankaŭ mi rimarku ke vivo sen poŝtelefono estas pli trankvila...

### Dankojn

Ni sincere dankas ĉiujn, kiuj helpis pri kaj en nia vojaĝo.

Speciale dankon al Renée Triolle kaj Yves Nicolas, ke tiu ĉi vojaĝo okazis.

Dankon pri afabla kaj komforta gastigo al ĉiuj, kiuj akceptis nin, al Gaston Riste (Romans), Monique Fillat (Mours), Renée Triolle (La Ciotat), Serge kaj Monique Eysseric (Montferrier), André kaj Paulette Andrieu (Vileneuve), Marie-Hélène Desert kaj ŝia familio (Ste-Foy-La-Grande), Chantal kaj Patrick Barret (St-Nazaire), Anne-Marie Argney (St-Malo).

Dankon al ĉiuj niaj novaj geamikoj, kiujn ni ekkonis en Francio...

Kostjantyn Demianenko,  
Berdjansko, Ukrainio